

Novjara leterkesto 1992.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 januaro 2 kaj 4

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Enirante novan jaron ni esprimas niajn bondezirojn al niaj aŭskultantoj. Ni scias, ke multaj el vi renkontas malfacilaĵojn pro la rapidaj ŝanĝoj, kiuj karakterizas la nunan tempon: ekonomia disfalo en la ekskomunisma mondo, militoj eĉ kun ties detruoj kaj suferoj en pluraj mondpartoj, senlaboreco en la krizanta okcidento, troa demografia kresko en la afrikaj kaj sudamerikaj landoj. La finon de la dudeka jarcento tutcerte karakterizas grandaj metamorfozoj. Nia espero estas, ke ili konduku la homaron al pli sentebla unueco. Sed ekzistas fortoj ĉefe armeaj en ĉiuj landoj de la mondo, kiuj vigle malhelpas la strebadojn al pli da justeco kaj pli da demokrateco. Ni troviĝas meze de gravaj konfliktoj, kies polusoj ne ĉiam malkaŝe manifestiĝas. Sed tamen videble fortikiĝis dum la pasinta jardeko la organizaĵoj supernaciaj kiel Unuiĝinta Naciaro kaj ties fakaj organizaĵoj kaj en Eŭropo Eŭropa Konsilio kaj Eŭropa Komunumo kaj ties fakaj institucioj.

A.- En nia novembra leterkesto ni legis leteron de nia portugala blinda aŭskultanto Joachim LAGARTIXA (Ĵuakim Lagartiŝa), kiu diris sian bedaŭron ne povi aliri modernajn esperanto-literaturaĵojn, ĉar mankas pri ili sonbendaj registraĵoj. La leteron de Ĵuakim LAGARTIŜA konkludis alvoko, kiun ni ripetas: "Eble ekzistas inter la aŭdantaro iu samideano, kiu povus helpi min. Iu, kiu ŝatus laŭtlegi en esperanto, havante la necesan libertempon kaj paciencon por surbendigi al mi verkon de Karolo Piĉ. Kompreneble mi liverus perpoŝte la kasedojn kaj ne necesus, ke la afero rapidu. Ĝi povus daŭri eĉ kelkajn monatojn. Li surbendigus nur kiam li havus tempon kaj mensan disponon."

Cl.- Ni havas la ĝojon anonci, ke kvar samideanoj proponis sian helpon. Tio estis tutcerte bela kristnaska donaco por Ĵuakim Lagartiŝa. Perletere ni organizis tiun kunlaboron sendante legindajn librojn al la aŭskultantoj, kiuj proponis sian helpon. Kaj ni petis al Ĵuakim LAGARTIŜA, ke li organizu la kontakton kun blindul-organizaĵo, por ke la realigotaj registraĵoj kontribuu al la riĉigo de porblindula sonbendbiblioteko. Ni scias, ke pluraj blinduloj regule aŭskultas niajn elsendojn kaj ankaŭ ŝatus pruntericevi registraĵojn. Povu rezulti fruktodona laboro el tiu internacia agado. Niajn korajn novjarajn bondezirojn ni esprimas al la respondintoj, kiujn ni citas:

A.- Bruno kaj Mary NAJBARO en KEIGHLEY, Britio, skribis: "La leterkeston hodiaŭ ni kontentige aŭdis... Responde al la alvoko legi iun piĉaĵon por blindulo, Mary farus tion nur se estas neniu alia, kiu sin proponas, ĉar ŝi jam estas plene okupata.

Cl.- Arnold VICTOR en New-York, Usono, skribis: "Mi ne sufiĉe atentis je via elsendo de la 3-a de novembro, sed mi rimarkis, ke iu sinjoro deziras la legadon de **Litomiŝla Tombejo**. Mi ne posedas tiun romanon mem, do se oni provizus min per ĝi, mi estus preta laŭtlegi ĝin kaj surbendigi ĝin per mia propra kasedmaŝino. Mi ankaŭ havas iom da aktora sperto. Bonvolu transsendi tiun mian proponon al la koncerna persono."

A.- Laurent VIGNAUD en LES PONTS-DE-CÉ, Francio, skribis: "Mi aŭskultis la elsendon pri la leteroj de vi ricevitaj, kaj skribas por proponi mian helpon al via portugala aŭskultanto. Mi neniam legis libron de Piĉ, eĉ libron de li mi ne havas (sed tutcerte povos akiri); mian

voĉon mi trovas ne aparte bela sed sufiĉe komprenebla: malgraŭ tio, mi tute pretas helpi lin. Probable skribis aŭ skribos al vi aliaj aŭskultantoj pli kompetentaj kaj spertaj: ne gravas, mia propono restas por aliaj verkoj... Alia fakto: mi apartenas al la tendenco kontraŭ-neologisma sed pensas ke tio tute ne malhelpas. Mi kalkulas pri vi por transdoni mian proponon al tiu aŭskultanto."

Cl.- Johannes WINDISCH en SINGEN, Germanio, skribis: "Hieraŭ mi aŭskultis vian elsendon. Kun intereso mi ĉiam ankaŭ sekvadas la opinioesprimojn de aliaj aŭskultantoj. Hieraŭ iu blinda samideano demandis en sia letero ĉu iu estus preta legi por li verkon de Piĉ. Mi mem ankoraŭ ne legis libron de tiu aŭtoro, ankaŭ mi ne posedas iun. Sed mi plenumos la deziron laŭ miaj eblecoj, tio estas ne tre rapide, sed kontinue, se aliu ne anoncos sin. Vi povos transdoni mian adreson al tiu samideano."

A.- Al tiuj kvar sinproponintoj ni sendis donace legindan libron, malgrandan al Mary NAJBARO, kiu estas tre okupita, kaj ni faris la neceson, por ke la kunlaboro povu ekstarti, petante al Ĵuakim LAGARTIŜA nin regule informi pri ĝia disvolviĝo, ke neniuj financaj problemoj ĝin haltigu. Ni donis al ĉiuj la necesajn konsilojn kaj ni raportos pri la sukceso de la agado, kiam ni scios, ke verko estis plene laŭtlegita.

Cl.- Sed ne nur al tiuj bonvoluloj ni esprimas niajn novjarajn bondezirojn. Komplemente al la leterkesto de la lundo 30-a de decembro de nia kolego Andy KÜNZLI, ankaŭ ni respondas al la leteroj kaj poŝtkartoj, kiuj nin vizitis.

A.- Saluton al Günther BECKER en BLIESKASTEL, Germanio kaj al Jason CASTLE ('ĝej-sn 'kae-sl) en SAN RAFAEL, Kalifornio, Usono, kiu skribis: "Kia granda surprizo aŭdi mian nomon... en via elsendo de esperanto ĉi-vespere. Mi ĵus revenis hejmen de kunveno de loka esperanto-grupo kaj rimarkis ke mi povus kapti nur la lastajn kvin minutojn de via sabata elsendo. Mi ne tre klare ricevis la signalon, sed la nomo ĵa 'zo kaptis mian atenton, kaj kiam mi aŭdis la vortojn "en San Rafael, Kalifornio, Usono", mi sciis ke vi ja parolis pri mi!

Cl.- Obeante nian peton Jason CASTLE ('ĝej-sn 'kae-sl) donis per la esperanta alfabeto fonetikan transkribon de sia nomo, kaj tiel ni verŝajne pli kontentige nomis lin hodiaŭ. Komence de tiu ĉi jaro ni ree petas ĉiujn skribantojn ĉiam interkrampe doni la fonetikan transkribon de siaj nomoj familiaj kaj individuaj kaj eĉ de sia loĝloko, tio per la esperanta alfabeto.

A.- Nia kalifornia aŭskultanto raportas, ke li akiris pli bonan radioricevilon por nin aiskulti. La samon diras pluraj aliaj skribintoj.

C.- Ni reciprokas la salutojn de Luis BLASCO en ZARAGOZA, Hispanio, de Jean CALAMY en AUBAGNE, Francio, de Jacques DONY en LA RICAMARIE, Francio, de Juliano DUCROCQ en CALAIS, Francio. Ĉiuj ĝojis aŭdi menciojn de siaj nomoj en pasinta leterkesto kaj Juliano DUCROCQ ŝatis la intervjuojn kun Erich Dieter KRAUSE.

A.- Ankaŭ novjarajn bondezirojn ni esprimas al Jirina kaj Vilmer JONASSON en STOCKHOLM, Svedio, al la anoj de Esperanto-Klubo de Helsinko, Finnlando kaj al Sydney FOX (sidni foks) en CAMBRIDGE, Britio, kiu ŝatis nian recenzon de la libro "Ne facilas esti Sloveno en Italio" kaj dankas por ĉiuj elsendoj de Svisa Radio Internacia, kiujn li juĝas altkvalitaj.

Cl.- Novjaran saluton al Karlheinz KERSTING, en Essen, Germanio, al Karel KRAFT en BOROTICE, Ĉeĥoslovakio, al la anoj de Libera Esperanto-Asocio en DÜSSELDORF, Germanio, al Georges LARGLANTIER en PARIS, Francio, al Vittorio MADELLA en PARMA, Italio kaj al la kvardeko da gesamideanoj el la ltala regiono PARMA, kiuj salutis el la vilaĝo FONTANELLATO okaze de esperantista fest-kunveno.

A.- Bondezirojn al Gabriel MORA I ARANA en MANRESA, Hispanio, al Heinrich NISCHWITZ en BENSHEIM, Germanio, al Ray PEERSON en DIDCOT, Britio, al Vilmos SÁGI en SZÉKESFEHÉRVÁR, Hungario, al la esperanto-grupo de la Sanatorio VOROŜILOV en la rusa urbo SOĈI, al J. STAELS en Bruselo, Belgio kaj al Mila kaj Gerard VAN DER HORST-KOLINSKA en Den HAAG, Nederlando.

Cl.- Estu por ĉiuj niaj aŭskultantoj fruktodona la jaro 1992-a. Jen ree la deziro, kiun ni esprimas.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras : Ĝis la reaŭdo !